## 82-A SAT KONGRESO - 18-25 Julio 2009
**Milano - Italio**

Por pliaj informoj, kiam haveblaj, kontaktu **la peranton** (vidu paĝon 10) aŭ vizitu **<http://www.sat-esperanto.org>.**

**Koresponda adreso:** Ĉefa kontakt-adreso: Andrea Montagner, @: andrea.montagner@arciesperanto.it

**OKK:** Andrea Montagner - Prezidanto: <andrea.montagner@arciesperanto.it>; Carlo Bourlot - Konsilisto: <c.bourlot@libero.it>; Nicola Ruggiero - Retpaĝo kaj rezervigoj <nicolaruggiero86@gmail.com>; Andrea Fontana - Kultura programo <fontanaandrea@fastwebnet.it>; Camilla Masciadri - Vizoj

| **Kongreskotizoj (€)** | Ĝis 28.02.09 | Ĝis 30.04.09 | Ĝis 30.06.09 | Poste |
|---|---|---|---|---|
| SAT-membro | 50 | 55 | 60 | 65 |
| SAT-geedzoj(se ambaŭ) | 75 | 85 | 90 | 95 |
| SAT-junuloj ĝis 25 j. | 25 | 30 | 35 | 40 |
| Nemembro | 60 | 65 | 70 | 75 |
| Junula nemembro | 30 | 35 | 40 | 45 |

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon

* La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV, PL, SL kaj SK ĝuas 30% rabaton.

* La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU ( krom SL) kaj eksa SU (krom EE, LT, kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50% rabaton.

* Kongresaneco ne transdoneblas al alia persono. La kotizo ne inkluzivas manĝadon kaj loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.

* La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson.

* Aliĝilon sen pago de kotizo kaj prezo de unu tranokto OKK ne traktos

**Atentu: Personoj el la landoj, kiuj bezonas enirvizon por Italio, devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2009. Pli poste ne plu eblos trakti tion. Ni petas ke vizpetantoj nepre aldonu necesajn datumojn en la aliĝilo.**

Kongresejo "Zumbini Rooms" Via Zumbini 6, 20143 Milan, Italio

Loĝejoj - Ĉambroj (Eŭroj po nokto po ĉambro se ne indikita aliel):

Zumbini Rooms: unulita 50, dulita 90, trilita 110 kvarlita 140.

Gastejo Burigozzo: Komunaj - 6-16 lokoj po ĉambro - 21 po nokto po persono

Privataj: unulita 50, dulita 70, geedza 80, trilita 90 kvarlita 110.

### *82nd SAT Congress 18-25 July 2009 in Milan (Italy)*

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*



**Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio**

# La Verda Proleto

**Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)**

Numero 430 ~~~ Oktobro 2008

## DEKLARACIO de la 81-a SAT-KONGRESO

La 81a Kongreso de SAT en Kazanlako (Bulgario) kunveninta inter la 9a kaj la 16a de aŭgusto 2008,

- per letero al ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Barato (Hindio), Israelo, Rusio kaj Usono en Bulgario, petas ke ili intervenu ĉe sia respektiva registaro por ke tiu ĉi rapide subskribu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas uzon kaj fabrikadon de kontraŭpersonaj minoj,
- konstatas,
  - ke tutmonde okazantaj eksterleĝigo, ĉelandlima blokado kaj administra malliberigo de enmigrantoj kontraŭstaras Homajn Rajtojn je libera cirkulado kaj je decaj vivkondiĉoj,
  - ke necesas forigi la ekonomiajn, militajn, klimatŝanĝajn kaj aliajn premojn kiuj kaŭzas kontraŭvolajn elmigradojn,
  - kaj devigas sin kontraŭbatali tiajn registarajn maljustaĵojn,
- konstatas, ke ter-mastrumaj kaj socipolitikaj problemoj estas nedisigeblaj kaj ke ilia solvo postulas dialektikan sintezon inter ekologiismo kaj socialismo,
- konstatas, ke la nuna malsat-krizo, same kiel aliaj socipolitikaj kaj Ter-mastrumaj problemoj ne povas solviĝi per almozpeto, humanitara kaj bonfara agadoj, sed per horizontala senpera interhelpo kaj interŝanĝo de spertoj kaj rimedoj : SAT estas unu el la iloj de tiaj interrilatoj,
- instigas laboristojn en post-socialismaj kaj aliaj mondopartoj rektigi la kapon kaj tutmonde organiziĝi por kontraŭbatali kapitalismon daŭre subpremantan ilin.

### *Declaration of the 81st SAT Congress*

*- an English translation appears on page 6*

# * S.A.T.E.B *

WORKERS'ESPERANTO MOVEMENT


| | |
|---|---|
| Prezidanto / *Chairperson* | Vakas *Vacant* |
| Sekretario / *Secretary*: | David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT Tel: 01555 759166 <davidekelso@yahoo.co.uk> |
| Kasisto / *Treasurer* | Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk> |
| **La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* | Vakas. Ĝis nova redaktoro elektiĝas, bonvolu sendi ĉiujn kontribuaĵojn al la sekretario (vidu supre). *Vacant - Until a new editor is elected, please send all contributions to the secretary (see above)* |


**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***

### REDAKTORO / *EDITOR*

Ankoraŭ mankas al ni redaktoro. La komitato serioze esploros ajnan proponon por tiu posteno - dankon.
*We are still without an editor. The committee will seriously consider any suggestions for this post - thank-you.*

### KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS*

**La SATEB-kotizo por 2008 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.**
***The SATEB subscription for 2008 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 9 / *Details and form on page 9*

**La SAT-kotizo por 2009 pagendos en Januaro (vidu paĝon 10).**

### SATEB - Jarkunveno 2008 / *SATEB - AGM 2008*

**Por kuraĝigi partoprenon, la komitato pagos, al la unuaj ses membroj kiuj tion petas, duonon de la vojĝkostoj (maksimume £50).**
***To encourage attendance, the committee will pay, to the first six members who ask for it, half their travel costs (maximum £50).***

**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
**THANK-YOU** - We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP

**LVP 431** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 28-an de febraro 2009
*Contributions are invited - to reach us by 28th February 2008*



## GVIDREZOLUCIO de la 81-a SAT KONGRESO

La 81a Kongreso de SAT kunveninta en Kazanlako inter la 9a kaj la 16a de aŭgusto 2008,

- — konstatas la bonordan leĝan oficialigon de Eldona Fako Kooperativa de SAT kaj alvokas interesatojn aliĝi al ĝi por kontribui al ĝiaj eldonprojektoj kaj al kreado de ĝia interna regularo,
- — instigas ĉiujn SAT-rondojn kunveni por plibonigi - helpe ankaŭ de ne-SATanoj - la retejan ĉefpaĝon, kaj en ĉiujn lingvojn traduki la du-frazan prezento-tekston pri SAT kaj la tekstojn "Kio estas Esperanto" kaj "Kio estas SAT",
- — vokas al pliaj homfortoj por enretigo de artikoloj el malnovaj numeroj de "Sennaciulo",
- — proponas ke la LEA-oj, SAT-rondoj kaj SATanoj rapide skribu al sia respektiva registaro por ke ĝi subskribu la konvencion projektitan en Oslo en decembro 2008 malpermesontan la uzon de kelkaj pafaĵoĵetoj el bomboj,
- — petas la plenum-komitaton zorgi ke en la venonta kongreso estos antaŭvidita ebleco organizi klerigsesiojn pri financaj demandoj kaj retej-mastrumado,
- — akceptas dumonatan aperritmon de duoblaj numeroj de "Sennaciulo" kaj invitas ĉiujn interesiĝantojn indiki sian retadreson por ricevo de ĉiumonata inform-letero,
- — vokas SAT-rondojn, SAT-frakciojn, LEA-ojn kaj SATanojn sendi precizajn informojn pri kursoj, varbado direkte al ekster-SATa medio kaj apero de artikoloj pri Esperanto aŭ SAT-rilataj temoj,
- — alvokas al ĉiuj perantoj, SAT-rondanoj kaj LEAanoj rememorigi al siaj kunuloj pri akurata kotizrepago,
- — alvokas membrojn al diverslingva tradukado de glumarko "Tutmonda Solidareco" kaj kompletigo per propraj sindikataj spertoj pri problemoj rilataj al internacia komunikado flugfolion "Unua de Majo",
- — proponas, okaze de Internacia Jaro de Lingvoj, ke la SATanoj emfazu siajn por-Esperantajn agadojn laŭ SATeca spirito,
- — spronas ĉiujn LEA-anojn kaj por-Esperantajn agantojn aliĝi al la Poresperanta Fako por pli vigle interŝanĝi spertojn.

### ***Resolution** (for internal guidance) **of the 81st SAT Congress***

*This resolution expresses the wishes of the congress on the way in which the committee should run SAT. It also makes proposals for the membership and affiliated, supportive, or otherwise linked organisations.*

*It covers arrangements for publications, calls for local action to persuade more governments to sign the Oslo Convention on cluster bombs etc., and various administrative matters including publicity.*

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.

SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.
*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language* ***Esperanto*** *to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-"nacia".
*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries. Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £35**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £18 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla - **£875** - rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £40. Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ
(Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ____________________

Nomo ______________________________________________

Adreso ______________________________________________

______________________________________________

(nedevigaj)-> tel: ______________________________________________

retadreso: ______________________________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco_________________________________




## SATEB Jarkunsido 2008 / *AGM 2008*

**La jarkunsido de SATEB okazos je 14.30, la 29-an de novembro ĉe: /**
***The SATEB AGM will be held at 2.30 pm on the 29th of November at:***
**Room 6, Camden Town Hall Committee Rooms, Camden Town Hall, Judd Street, London WC1H 9JE. (Apud /** ***next to*** **Euston Road)**

### Tagordo / *Agenda*

1. **Enkonduko (*Introduction*)**
2. **Pardonpetoj (*Apologies*)**
3. **Protokolo de la pasintjara jarkunsido (*Minutes of the last AGM*)**
4. **Raporto de la komitato (*Committee report*)**
5. **Kasraporto (*Treasurer's report*)**
6. **Membraro (*Membership*)**
7. **Publico (*Publicity*)**
8. **SAT**
9. **Estonteco de SATEB (*Future of SATEB*)**
10. **Balotoj (*Elections*)**
11. **Aliaj aferoj (*Any other business*)**




La komitato pardonpetas pro kaj la malfrueco de la kunveno kaj la mallonga averto. La kialojn ni klarigos dum la kunveno.

*The committee apologises for the lateness of the meeting and the short notice. This will be explained at the meeting.*

# Ek al la Fatrasbatalo !

Ne estas granda sekreto ke SATEB ne tre bonstatas. La membronombro daŭre falas, jam dum pluraj jaroj. Eĉ inter niaj malmultaj membroj, nur eta nombro efektive agadas. La Verda Proleto daure aperas, kvankam malofte, neregule. Ĉiujare - ĝis nun - ni jarkunsidas por gratuli nin pro la pretervivo kaj debati kiel kuraci la pacienton. Tamen okazas nenio, ŝanĝiĝas nenio. Nu, do ?

SATEB kredeble estas ekstrema kazo, sed ne unusola. SAT mem suferas pro similaj simptomoj kaj la (ne)landaj organizoj same; nur en Francio (pliprecize, Franclingvio) videblas vivo, kresko, agado. Kio okazas ? Ĉu ni simple estas pli feblaj ol niaj antaŭuloj? Ĉu pigraj? Aŭ stultaj ? Aŭ iom da ĉiuj tiuj ? Mi opinias ke ne. Kiam mi estis tro juna por saĝe elekti, mi studis sociologion; de tiu tempo mi ne povas ne ĉiam serĉi sociajn kaŭzojn de sociaj fenomenoj. Ŝajnas al mi ke SATEB, SAT kaj similaj organizaĵoj apartenas al pasinta epoko - epoko de kluboj, asocioj, kunvenoj, lumbildoj, tetrinkado, komuna kantado k.c. Hodiaŭ formortas - almenaŭ en okcidentaj landoj - preskaŭ ĉiuj nekomercaj, volontulaj organizaĵoj kaj agadoj. Antaŭ pluraj jaroj, Humphrey Tonkin (fondinto de la ne tre burĝa Junularo Esperantista Brita, eksprezidanto de monda organizaĵo kies nomon mi ne aŭdacas mencii en ĉi progres-ema eldonaĵo) rimarkigis, en artikolo pri simila temo, ke la solaj volontulaj organizaĵoj kiuj hodiaŭ prosperas estas 'kampanjaj organizaĵoj', kiuj havas simplan, unununuran celon; se ili atingas tiun celon, ili malfondiĝas kaj la membroj serĉas novan kampanjon! La alia granda faktoro, apenaŭ eĉ mencienda, estas la ĉiea ttt, la interreto, tiu virtuala mondo.

Laŭ Lanti, SAT ne estas organizaĵo por Esperanto, sed organizaĵo per Esperanto. Per nia komuna lingvo, ni povas transsalti barilojn de lingvo, kulturo, nekleriĝo, eĉ geografio, por antaŭenigi niajn komunajn celojn, kiuj estas ……… kio, precize? Ĉu la klasbatalo (ĉu kredeble ĝi ankoraŭ daŭras, sen rezulto?), ĉu revolucio, ĉu socia justeco, paco, sennacieco, homaj rajtoj ………? Mi ne plu certas. Ĉu vi ?

Argumenteble, en tiu postmoderna, virtualisma epoko, SAT (kaj SATEB) renaskiĝu kiel 'kampanjo' en la esperanta komunumo: kampanjo por malneŭtraligi la movadon. Mi ne kredas ke esperantanoj, landaj kaj fakaj asocioj, eĉ UEA mem, vere neŭtralas pri torturo, pri malsato, pri maljusto. Pri privatigo de trajnsistemoj, eble jes, sed pri la grandaj, tutmondaj demandoj sociaj kaj ekonomiaj, ne eblas. Kial do plu ŝajnigi ? Ni diru tion, laŭte, ofte kaj klare, ne de ekstere sed ene de la tutmonda esperanta komunumo. Ĉu, aŭ ne ?

David Kelso davidekelso@yahoo.co.uk

5 Craigenhill Road, Kilncadzow, Carluke, ML8 4QT



# SATEB

## WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas "diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T."
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.
*SATEB - aims "to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT."*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj.
SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information*** *please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or* ***email*** *to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.* : £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 3)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 3)*

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* ______________________________

/ Adreso ______________________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ______________________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ______________________________

*You may send my details to other Esperanto organisations* ☐
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

*I enclose* / : } *membership* / kotizon £_________ *donation* / donacon £_________
Mi kunsendas } *subscription* / abonon

*Date* / dato______________________ *Total /* Sumo: £___________

*cheque/PO/other* _______________ ĉeko/poŝtmandato/alia_______________

*cheques etc. payable to* / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"

## Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto: - Alternativaj bankoj

Post mia interveno pri la kazino-kapitalismo mi nepre devas atentigi pri la pozitiva rolo de la alternativaj bankoj:

Oni povas konstati ke la nuna krizo tuŝas malpli la kooperativajn bankojn, ĉar iliaj tradiciaj servoj utilas ĉefe al loka klientaro kaj ne celas spekulativajn profitojn. De dudek jaroj ekzistas ankaŭ kelkaj alternativaj bankoj ĝis nun ne sufiĉe konataj. Ilia principo estas travidebleco por la kliento, kiu scias kiamaniere lia mondepono estas utiligata, ĉar li volas konscie investi en bonsencajn projektojn laŭ etikaj kriterioj kaj ne serĉas plej rapidan kaj maksimuman gajnon sed kontentiĝas per modesta interezo. Iuj alternativaj bankoj ankaŭ proponas investojn por alternativaj energioj aŭ mikrokreditoj.

Rikardo

Jes tio ankaŭ okazas en Francio, kie la du alternativaj bankoj, la NEF kaj la "Crédit coopératif", estas malpli vunditaj de la krizo kaj eĉ havas novajn klientojn.

Rikardo, ĉu la malnova "WIR" sistemo (kiu estas pli "interŝanĝa") daŭre funkcias en Svislando?

Amike, Djemil

Mi intervenas ĉidebate, ĉar mi havis okazon ĉimatene aŭskulti interesegan elsendon de franclingva radio "France Culture". Tiu elsendo nomiĝas "Terre à Terre". Ĝi pritraktis la temon precize pri alternativaj k kooperativaj bankoj. Tiu elsendo estas aŭskultebla ĉe la retejo de "France Culture". Mi ne havas nun tempon por verki raporton pri ĝi (ĉar mi bezonus reaŭskulti ĝin), sed tamen estus interese ke estu iu raporto en ĉi tiu diskuto. Mi vere ne scias, ĉu mi havos tempon zorgi pri tio. Do se iu alia pretas tion fari, mi vere ĝojus!

En la tuta mondo ekzistas tiaj institucioj kiuj rolas diversmaniere sed almenaŭ pozitive. Eble tio povos estigi eblon verki komunan artikolon por Sulo?...

Kamaradece, Robin BETO

Alternativaj bankoj jam ekzistas je la ekapero de mono - kiu ja estas atingaĵo de civilizo nia.

Ekzistas ankau interŝanĝo de varoj au servoj senmonaj -- nuntempe ĝi okazas precipe en familiaj rondoj .( Ne pagata hejma laboro de gepatroj aŭ laboro en establoj, kluboj)

Ricevis alternativan nobelpremion iu bankisto el Hindio- kiu fondis bankon por mikrokreditoj.

En Svislando ekzistas bankoj lau diversaj tipoj- ankau " kooperativa " mutuala" verdaj, alternativaj , kantonaj . WIR banko kaj certe multaj aliaj.

Jen bela ilustraĵo : pli bone vi fondu bankon - ol prirabi ĝin! Ekzemple FEL fondis propran bankon

ruĝ-gefrate d.rooke

En Francio ,ni havas le NEF - Dumont Charly

~~~~~

Ĉi tiu ĉerpaĵo estas ekzemplo de la enhavo de la SAT-diskuto.(kun gramatikaj korektoj). Anoj de SAT povas vidi la tutan gamon. Por aliĝi al SAT, vidu p. 9.

*A sample from the SAT email discussion group: - about the alternative banks. The group is open to SAT members, and is in Esperanto - the language of SAT*



## *Class Wargames .........*

*It's no secret that SATEB has its problems. Membership has continued to fall, for some years now. Even among the members we do have, only a few are really active. La Verda Proleto continues to appear, albeit less often and a bit irregularly. Every year - to date - we have an AGM to congratulate ourselves on our survival and to debate how best to treat the patient. However, nothing happens, nothing changes. So ?*

*OK. so SATEB is an extreme case, but by no means alone. SAT itself is suffering from similar symptoms and its other local organisations (LEA-s) likewise. Only in France (more precisely, French-speaking territories) is there evidence of life, development, activity. What's going on? Are we just not as up to it as those before us? Or just plain lazy, or stupid ? Or a bit of all that? I think not. When I was too young to know better, I studied sociology; as a result, I just naturally look for social explanations for social phenomena. I reckon SATEB, SAT and similar organisations belong to a bygone age - an age of clubs, meetings, slideshows, teabreaks, sing-alongs and the like. Today - in the West, at least - almost all non-commercial, voluntary organisations and activities are having a bad time. Some years ago, Humphrey Tonkin (founder of the left-leaning Young British Esperantists and former president of an international organisation whose name I dare not whisper in this enlightened publication) commented in an article on this subject, that the only voluntary organisations still prospering are 'campaigning organisations' - who have a single, simple objective. Once that is achieved, it winds itself up and the members go off in search of another 'cause'. And, of course, the Internet ....*

*Lanti often said that SAT isn't an organisation to promote Esperanto, but an organisation that uses Esperanto. Thanks to our shared language, we are unrestrained by barriers of language, culture, lack of education, even geography, in pusuit of our common goals, which are ..... what, exactly ? The class struggle (that surely isn't still going on, with no winner ?), or revolution, social justice, peace, anationalism, human rights ...... I'm no longer quite sure. Are you ?*

*It might be argued, in this postmodern, virtual age, that SAT (and SATEB) should be 'born again' as a 'campaign' within the Esperanto community: a campaign to de-neutralise the movement. I don't believe for a second that Esperantists in general, let alone national and specialist associations, even UEA itself, are really neutral concerning torture, famine, injustice. About the privatisation of railways, perhaps, but about the big social and economic questions of the day - no way. So why go on kidding themselves? Let's say that, loud and clear, over and over, not from outside but from within the worldwide Esperanto community. What do you think*

*- Yes, or no ?*

*David Kelso davidekelso@yahoo.co.uk*

*5 Craigenhill Road, Kilncadzow, Carluke, ML8 4QT*

*Note that the above is not a word-for word translation of the article opposite.*
~~~~~

## ***Declaration of the 81st SAT Congress***

*(translation of the front page)*

*The 81st Congress of SAT in Kazanlak (Bulgaria), meeting from the 9th to the 16th of August 2008,:*

- *in a letter to the ambassadors of China, Finland, India, Israel, Russia and the United States to Bulgaria requests them to call upon their respective governments to sign quickly the Ottawa Convention, which bans the use and manufacture of anti-personnel mines,*
- *notes*
  - *that the putting outside of the legal system, barring at the border, and administrative imprisonment of immigrants, throughout the world, violate human rights to free movement and decent living conditions,*
  - *that economic, military, climate change, and other pressures that cause involuntary emigration need to be eliminated,*
  - *and commits itself to combat such government supported injustices,*
- *- notes that problems of earth management and socio-political problems are inseparable and that their solution requires dialogue to form links between ecologism and socialism,*
- *- notes that the present hunger crisis, just like other socio-political and earth management problems, cannot be solved through begging and/or through humanitarian and benevolent activities, but rather by providing horizontal direct mutual aid and by exchanging experiences and resources: SAT is one of the instruments of such mutual relations,*
- *- encourages workers in post-socialist and other areas of the world to hold their heads up and organise throughout the world to combat capitalism that continues to oppresses them.*

~~~~~

## Vortoj de Zamenhof pri laboristoj

" Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, - ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo. "



**LabourStart** (http://www.labourstart.org/eo/)

**Tutmondaj sindikataj novaĵoj**

La esperanta ttt-paĝo de la sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias. Ĝi ĉiam bezonas pli da ret-ligataj helpantoj, kiuj kapablas resumi esperante anglalingvajn artikolojn.

Se vi opinias, ke vi povos helpi, aŭ konas iun, kiu eble povos, bonvolu kontakti: Paul Hewitt <paul@esperanto.freeserve.co.uk>

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt, David Curtis, Alwyn Kind kaj la Grimsby Esperanto-Grupo pro iliaj ĝisnunaj laboroj

### Tutmondaj sindikataj novaĵoj

Italio Transporto striko 30-okt-2008
Ĉinio Oficperdo 30-okt-2008
Venezuelo Strikoj kaj subontraktoj 30-okt-2008
Hindio Oficperdo je aerlineo 24-okt-2008
Meksiko Policanoj atakis instruistojn 24-okt-2008
Palestino Instruistoj strikas 24-okt-2008
Mondo Instruistoj gravas 17-okt-2008
Mondo Ofico-detruo 17-okt-2008
Niĝerio Petrollaboristoj strikos 17-okt-2008
Mondo La vero pri mondaj komercmarkoj 11-okt-2008
Usono Sindikatoj kontraŭ la savoplano 11-okt-2008
Sudafriko Bojkoto de Woolworths 11-okt-2008
Argentino Memoru Julio Lopez 27-sep-2008
Sudafriko Sindikatoj protestas 21-jul-2008
Hindio Diamanto-laboristoj protestas 21-jul-2008

Unu raporto el la granda paĝaro:-

### Meksiko: Policanoj atakis instruistojn

Je 7-9 oktobro policanoj rompis stratproteston de 200 enloĝantoj kaj strikantaj instruistoj en la Morelos regiono sude de Meksiko City. 700 protestantoj blokis la ĉefan vojon inter Meksiko City kaj Cuernavaca dum 7 horoj. Tiu protesto kondukis al negoco kaj oficistoj kunsentis liberigi plurajn protestantoj.

La instruistoj protestas kontraŭ plano de Prezidento Felipe Calderon Hinojosa kaj sindikatestro Elba Esther Gordillo Morales.

Instancoj kaj policanoj ankaŭ batalis kontraŭ gepatroj kaj instruistoj sur la Cuautla-Puebla ĉef-vojo, kaj sur la Cuautla- Jojutla ĉef-vojo.

Negoco daŭras inter instruistoj kaj oficistoj, sed la registaro ne pagas strikantajn instruistojn kaj ekdungis anstataŭulojn. Laŭ oficistoj, ili laboras ĉiutage por eviti ribelon kiel tiu en Oaxaca en 2006.

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*
~~~~~